




Boletín

n° 412 Octubre - Diciembre 2016



Asociación de utilidad pública

FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA, ESPERANTO-FEDERACIO

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 412

Redakto-skipo

Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

*La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Félix M. Jiménez

Vicsekretario: Águeda Biurrún

Kasisto: Raúl Mtnez. Anguita

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor
Juan José Vera
Alejandro Escobedo

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

Salutvortoj

Karaj membroj de Hispana Esperanto-Federacio kaj karaj legantoj:

Ni volas komenci tiun ĉi numeron dezirante nome de la estraro de la asocio ke tiu ĉi jaro 2016 kiu nun komenciĝas alportu al vi ĉiuj feliĉajn kaj prosperon, kaj ke ĝi estu same prosperiga por Esperanto kaj nia komuna afero.

Ni povas fari tion ĉi jam en la nova jaro, eĉ se tiu ĉi numero finas la kolekton de la jaro 2015, pro tute pravigebla cirkonstanco. Nome, la prokrasto de la apero de la ekzemplero kaj de ĝia alveno al viaj hejmoj kaj grupoj estas ĉifoje intenca. Ne temis pri fuŝo aŭ mallaboremo de la estraro, la redaktoro aŭ la kontribuantoj, sed ni preferis atendi ĝis la komenco de la jaro, por povi inkludi en la revuo dokumentojn necesajn por la funkciado de la asocio. Tio ŝuldiĝas al la deviga kunvoko de ordinara Ĝenerala Kunveno de la asocio, kiu laŭleĝe ne povas atendi ĝis la okazigo de la Hispana Kongreso, ĉifoje celebrata en julio, por aprobi la oficialajn kontojn kaj raportojn. Tial, vi trovos en tiu ĉi numero la kunvokon por tiu Kunveno, eĉ se ni antaŭvidas okazigon ankaŭ de Eksterordinara Kunveno dum tiu Kongreso, kiam verŝajne pli da membroj povos ĉeesti.

Notu ke en tiu ĉi Kunveno (prefere en la ordinara, sed ĉiukaze en la eksterordinara) oni devas renovigi la Estraron de la asocio. Kiel ni jam antaŭe komentis, pluraj estraranoj anoncis sian intencion ne rekandidati, kaj tial ni denove alvokas vin ĉiujn pripensi vian elpaŝon por refreŝigi la gvidantojn kaj la gvidliniojn de nia Federacio.

Ĉiukaze, eĉ se vi mem ne povus kandidati por tiuj postenoj, via plua membreco kaj via aktivado estas tute nemalhavebla por la plua firmigo de la asocio. Ne forgesu rekotizi por tiu ĉi jaro, kaj ne hezitu kontakti la estraron se vi konsideras ke vi povas alimaniere kontribui al la asocio.

Eble 2016 ne fariĝos la jaro de la Fina Venko, sed certe ĝi montriĝos favora por nia afero kaj por la komuna ĝuado de nia internacia lingvo.

José Antonio del Barrio
Prezidanto de HEF

Enhavo

Salutvortoj	1
Asamblea General Ordinaria/Ordinara Ĝenerala Kunsido	3
Cuentas Pérdidas y Ganancias	4
Raporto pri aktivajoj en 2015	6
Agadlinioj 2016	9
Presupuestos 2016	10
La 28a de februaro finiĝas la unua periodo por aliĝi al la hispana kongreo	11
Loĝado dum la kongreso	12
Fundación Esperanto	13
19a Andaluza Kongreso de Esperanto en Jerez de la Frontera	14
Pri Grupoj kaj Asocioj	16
Institucia Agado	20
Eldonita la traduko de <i>Bohemiaj Lumoj</i>	24
Finfine <i>Bohemiaj Lumoj</i> vidis la lumon	25
Poezia Angulo	26
Forpasis nia amiko Darío Rodríguez	27
La esperantista historia de Darío Rodríguez	28
Forpasis profesoro Herrera	31
Lasta-horo novaĵo pri esperanza muziko	32

Ĉefa kovrilo: foto pri Monaĥejo de Guadalupe kiun oni vizitos dum la Kongreso
Post kovrilo: Aliĝilo pri la Hispana Kongreso de Esperanto

NEKROLOGO

Kun granda bedaŭro ni ricevis tristan novaĵon: forpasis la patro de Toño del Barrio, la HEF-prezidanto. La redakcio de *Boletín* esprimas al li plej koran kondolencon kaj la konvinkon, ke homecaj homoj ne mortas: ili per siaj faroj sin transvivas.

ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA

El Presidente de la Federación Española de Esperanto les invita a asistir a la Asamblea General Ordinaria, que tendrá lugar el domingo 17 de abril de 2016, a las 10:30 horas (a las 11:00 en segunda convocatoria) en la sede de la asociación, calle Rodríguez San Pedro, 13, 3º-7, de la localidad de Madrid, con el siguiente orden del día:

- 1.- Lectura y aprobación del acta de la anterior asamblea (3 de mayo de 2015).
- 2.- Aprobación de las cuentas y Tesorería del 2015.
- 3.- Aprobación de la Memoria de actividades de 2015.
- 4.- Informe sobre los socios.
- 5.- Renovación de la Junta Directiva.
- 6.- Ruegos y preguntas.

IMPORTANTE: Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, por favor que envíen un mensaje comunicándolo, indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico admin@esperanto.es o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 17 de abril.

El Presidente de HEF
José Antonio del Barrio Unquera

ORDINARA ĜENERALA KUNSIDO

La Prezidanto de HEF alvokas vin ĉeesti Ordinaran Ĝeneralan Kunsidon, kiu okazos la 17-an de aprilo de 2016 (dimanĉe), je la 10:30 horo (je la 11:00 horo dua alvoko), en la sidejo de la asocio, strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º-7, Madrido, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la pasinta kunveno (3an majo 2015).
- 2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2015.
- 3.- Aprobo de la Raporto pri aktivajoj de 2015.
- 4.- Informo pri la anaro.
- 5.- Renovigo de la Estraro.
- 6.- Sugestoj kaj demandoj.

GRAVA RIMARKO: La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de iu alia membro, bonvolu transdoni mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEFa retroŝta adreso admin@esperanto.es, aŭ per ordinara poŝto al la oficejo de la asocio, antaŭ la 17a de aprilo.

La Prezidanto de HEF
José Antonio del Barrio Unquera

CUENTA DE PÉRDIDAS Y GANANCIAS		
	2015	2014
1. Ingresos Afectos a la Actividad	7.762,56	6.928,37
b) Prestaciones de servicios (<i>Venta de libros, Camisetas, Cursos...</i>)	636,40	862,37
c) Ingresos de Gestión Corriente (<i>Cuotas y Congresos</i>)	7.126,16	6.066,00
4. Aprovisionamientos	-434,77	-651,82
a) Consumo de mercaderías (<i>Libros</i>)	-434,77	-651,82
5. Otros Ingresos de la Actividad	106,00	38,00
b) Subvenciones, Donaciones y Legados	106,00	38,00
7. Otros Gastos de la Actividad	-6.868,92	-6.952,18
a) Servicios Exteriores	-6.868,92	-6.952,18
a2) <i>Reparaciones y Conservación</i>	-540,54	-
a5) <i>Primas de Seguros</i>	-112,63	-106,72
a6) <i>Servicios Bancarios y Similares</i>	-267,07	-356,71
a7) <i>Publicidad, Propaganda y Relaciones Públicas</i>	-4.218,10	-4.356,30
a8) <i>Suministros</i>	-226,33	-195,24
a9) <i>Otros Servicios</i>	-1.504,25	-1.937,21
b) Tributos	-	-
A.1) RESULTADO DE LA ACTIVIDAD	564,87	-637,63
14. Ingresos Financieros	-	-
b2) De Instrumentos Financieros en Terceros	-	-
15. Gastos Financieros	-	-
b2) Por deudas con terceros	-	-
A.2) RESULTADO FINANCIERO	-	-
A.3) RESULTADO ANTES DE IMPUESTOS	564,87	-637,63
A.4) RESULTADO PROCEDENTE DE OPERACIONES CONTINUADAS	564,87	-637,63
A.5) RESULTADO DEL EJERCICIO	564,87	-637,63

BALANCE DE SITUACIÓN		
ACTIVO	<u>2015</u>	<u>2014</u>
A) ACTIVO NO CORRIENTE	62.390,91	62.390,91
II. Inmovilizado material	62.390,91	62.390,91
1. Terrenos y construcciones	60.101,21	60.101,21
211. Construcciones	60.101,21	60.101,21
2. Otro inmovilizado material	2.289,70	2.289,70
232. Biblioteca	2.289,70	2.289,70
B) ACTIVO CORRIENTE	39.249,09	38.684,22
II. Existencias	2.222,04	2.535,81
1. Comerciales	2.222,04	2.535,81
300. Libros y material diverso	2.222,04	2.535,81
III. Usuarios y Deudores Varios	33,00	517,00
3. Patrocinadores, Afiliados y Otros Deudores	33,00	517,00
447. Socios	33,00	517,00
V. Inversiones financieras a corto plazo	-	-
5. Otros activos financieros	-	-
566. Depósitos constituidos a corto plazo	-	-
VII. Efectivo y otros activos líquidos equivalentes	36.994,05	35.631,41
1. Tesorería	36.994,05	35.631,41
570. Caja, euros	52,99	126,39
572. Cuenta en UEA	1.671,80	1.486,40
572. Bancos e instituciones de crédito c/c vista, euros	35.269,26	34.018,62
TOTAL ACTIVO	101.640,00	101.075,13

<u>PASIVO</u>	<u>2015</u>	<u>2014</u>
A) PATRIMONIO NETO	101.608,00	101.043,13
A1) Fondos propios	101.608,00	101.043,13
I. Capital	101.043,13	101.680,76
101. Fondo Social	101.043,13	101.680,76
VII. Resultado del ejercicio	564,87	-637,63
129. Resultado del ejercicio	564,87	-637,63
C) PASIVO CORRIENTE	32,00	32,00
V. Acreedores comerciales y otras cuentas a pagar	32,00	32,00
3. Acreedores varios	32,00	32,00
410. Acreedores por prestaciones de servicios	32,00	32,00
TOTAL PATRIMONIO NETO Y PASIVO	101.640,00	101.075,13

RAPORTO PRI AKTIVAĴOJ 2015

1. INTERNA ADMINISTRADO

1.1 La estraro kunsidis 6 fojojn.

1.2 Okazis unu ĝenerala kunveno, ordinara, majo la 3an de 2015 por aprobi kontojn kaj raporton de 2014, inter aliaj aferoj.

1.3. Dum la Ĝenerala Kunveno, Águeda Biurrún estis elektita vicsekretario de la Estraro. Alejandro Escobedo anstataŭis Jesús García Cano kiel membro de la estraro, reprezentanto de la junulara sekcio HEJS.

1.4. La junulara sekcio renovigis sian estraron kaj komencis reorganiziĝi.

1.5. Oni komencis uzi novan bankokonton ĉe Triodos Bank, aldone al la bankokonto ĉe BBVA.

1.6. Agadlinioj 2015: estis la dua jaro uzante tiun novan agadplanon. La agadlinioj detalias la aktivaĵojn celitajn de la asocio dum la jaro kaj permesas taksu la rezultojn por plibonigi la agadon dum venontaj jaroj.

1.7. Oni eldonis kvar numerojn de “Boletín” (409, 410, 411 kaj 412).

1.8. Biblioteko *Juan Regulo Pérez*: Ĝi daŭre estas alirebla de ĉiuj, tamen nur HEF-anoj rajtas prunt-preni. La katalogo estas plu disponebla pere de la HEF-retpaĝo, kaj oni ĝin migris al pli potenca mastrumsistemo Koha. Ni komencis poluri la rikordojn kaj krei la paralelan datumbankon pri aŭtoritatoj. Dum 2015 ĉ. 25 novaj ekzempleroj estis aldonitaj al la kolekto.

1.9. Bitoteko: Dum 2015 oni aldonis pli da materialo (ĝi atingis 5000 rikordojn komence de januaro 2016). Oni aŭtomatigis la kreadon de miniaturoj por ĉiuspecaj dokumentoj. Oni poluris la datenbazon reenbitotekigante perditajn dosierojn. Oni konvertis al taŭga formato kaj enbitotekigis la videojn kreitajn de Adúriz en diversaj E-aranĝoj. Estis daŭrigita la alŝutado de gazeteltondadoj kaj radiaj kaj televidaj programoj.

1.10. Daŭris la sendado de la “Bitbulteno”, informilo sendata restpoŝte al la anaro kaj aliaj interesatoj. Ĝi estas dulingva (hispana kaj esperanta).

1.11. Sociaj retoj: HEF kaj HEJS havas kontojn en Facebook, Twitter kaj Google+, kiuj estas regule uzataj por disvastigi informojn pri aktivajoj kaj pri E-o. Oni aldonis pliajn videojn al la kanalo de HEF en Youtube.

2. INSTRUADO

2.1. Membroj de HEF gvidis kursojn en kelkaj urboj tra la tuta ŝtato.

2.2 Unu membro de HEF komencis la Interlingvistikajn Studojn de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. La studoj daŭros tri jarojn.

3. KONGRESOJ

Organizitaj de HEF aŭ ties aliĝintaj asocioj

3.1. 74a Hispana Kongreso okazis en Cullera (Valencilando), inter la 1a kaj 3a de majo, organizata de HEF kaj VEA (ĝi ankaŭ estis samtempe Valencilanda Kongreso). Partoprenis ĉirkaŭ 90 homoj.

3.2. 23a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Roses (Katalunio), 3a-10a oktobro.

3.3. 19a Andaluzia Kongreso, 30a de oktobro ĝis 1a de novembro, en Jerez de la Frontera.

3.4. E-asocioj apartenantaj al HEF festis la Zamenhofan Tagon tra la tuta ŝtato dum la dua semajno de decembro.

Partoprenataj de membroj de HEF

3.5. 100a Universala Kongreso en Lille (Francio), 25a julio – 1a aŭgusto. Ángel Arquillos agis kiel B-Komitatano de HEF kaj zorgis pri la budo de HEF en la Movada Foiro. Krom tio, partoprenis pli ol 50 hispanoj.

3.6. 71a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto en Wiesbaden de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto. HEJS partoprenis la kunvenojn de TEJO, reprezentita de sia prezidanto.

3.7. 88a SAT-Kongreso en Nitra (Slovakio), inter la 8-a kaj 15-a de aŭgusto.

3.8. 31a ARKONES en Poznano (Pollando), kie membro de HEF projekciis la filmon “Stranga nupto”, produktitan en la sidejo de MEL fine de 1979 kaj komence de 1980.

3.9. 37a Kataluna Kongreso de E-o en Mataró (Barcelono), 30a de oktobro ĝis 1a de novembro

4. DISVASTIGO

4.1. Membro de HEF faris prelegeton pri Esperanto en mezlernejo “Ciudad de Jaén” (Madrid) la 6an de marto.

4.2. Prelego de José A. del Barrio ĉe CAUM, Club de Amigos de la Unesco en Madrid (Klubo de Amikoj de Unesko en Madrid) pri la nuno kaj estonto de Esperanto, 17an de marto.

4.3. Tradicia legado de “Don Kihoto” dum la Internacia Tago de la Libro (24a aprilo) en Madrido (Círculo de Bellas Artes): du esperantistoj legis paragrafojn de la esperanta traduko de la verko.

4.4. Ekspozicioj de paneloj en mezlernejo de Pinto (Madrid), dum septembro, kaj en Biblioteca Pública Benjamín Jarnés, de Zaragozo fine de novembro ĝis meze de decembro. Por inaŭguri tiun ĉi lastan, la estrarano Eduardo Berdor prelegis pri Esperanto.

4.5. Por la 400a datreveno de la dua parto de “Don Kihoto” HEF donacis kelkajn librojn al la Biblioteko de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando, kiu havas esperantan sekcion ĉe ĝia Fakultato pri Filologio, i.a. *Don Kihoto*, *Don Kihoto parolas esperanton*, kaj *Tirano Banderas*. Ankaŭ donacis *Don Kihoto* kaj *Don Kihoto parolas esperanton* al la loka klubo de Istanbul, Turkio, kaj ĉi-lastan verkon al la klubo de Tuluzo, Francio.

5. AMASMEDIOJ

5.1. La gazetara servo de HEF sendis 11 gazetarajn komunikojn, pri aferoj diversaj, inter alie: hispana kongreso en Cullera, andaluzo kongreso, Tago de Esperanto, Zamenhof-Tago, Eŭropa Tago de Lingvoj, datreveno de la liberigo de koncentrejo de Aŭŝvico kaj ties rilato al Esperanto, ktp.

5.2. Sekve al tiuj komunikoj aŭ aliaj agadoj, aperis artikoloj pri Esperanto en ĵurnaloj kiel *El País*, *El Diario*, *La Voz de Galicia*, *Xornal de Galicia*, *Diario de Navarra*, *Diario de Teruel*, *El Correo* kaj aliaj. Regule publikigas novaĵojn pri Esperanto la retĵurnalo Tercera Información.

5.3. Aperis intervjuoj al esperantistoj kaj informoj pri Esperanto en diversaj radio, interalie: Radio Nacional de España, Radio Onda Latina, Ibiza Blue Radio, SER-Vitoria, Radio Aragón, Radio Mataró kaj aliaj.

6. ALIAJ AKTIVAĴOJ

6.1. Okaze de la datreveno de la rezolucio de UNESCO rilate al Esperanto, HEF prenis kontakton kun la Hispana Komisiono por Unesko. La prezidanto kaj sekretario de HEF renkontis la prezidanton de tiu oficiala Komisiono. HEF sendis leteron petante la apogon de la Komisiono por la sponsorado fare de Unesko de la 100a datreveno de la morto de d-ro Zamenhof en 2017.

6.2. HEF reprenis la kontakton kun CAUM, Club de Amigos de la Unesco en Madrid (Klubo de Amikoj de Unesco en Madrido), kie la Prezidanto José A. del Barrio prelegis (vidu punkton 4.2.).

6.3. Ana Manero, membro de HEF kaj respondeculo de la Biblioteko kaj Bitoteko, ricevis Diplomon pri Elstara Agado de UEA pro la projekto Bitoteko dum la 100a UK en Lille.

6.4. HEF ricevis donacadon de informadika materialo fare de la oficiala organizo Patrimonio Nacional, ene de ties kampanjo de apogo al neregistaraj organizaĵoj.

6.4. HEF ricevis donacadon de informadika materialo fare de la oficiala organizo Patrimonio Nacional, ene de ties kampanjo de apogo al neregistaraj organizaĵoj.

6.5. HEF en kunlaboro kun Madrida Esperanto-Liceo kunmemoris la Eŭropan Tagon de Lingvoj per prelego en sia sidejo fare de Juan del Castillo.

6.6. HEF sendis leteron al la Universitato de Kordovo por apogi la iniciaton de Andaluza Esperanto-Unuiĝo por peti la agnoskon de Esperanto kiel unu el la lingvoj taŭgaj por plenumi kondiĉojn pri akiro de diplomo.

6.7. Najbara asocio de la kvartalo San Fermín (Madrido): la 22an de novembro la poeto Miguel Fernández deklamis poezion en e-o dum la festo por la aprobo de nova biblioteko por la kvartalo.

Originalo subskribita de la sekretario Félix Manuel Jiménez Lobo.

AGADLINIOJ 2016

Dum la Ordinara Ĝenerala Kunveno devos esti renovigata la estraro. Do, estos la nova estraro kiu devos proponi la agadliniojn por 2016 (kiuj devos esti aprobataj dum eksterordinara kunveno okazonta dum la Hispana Kongreso 2016). Tamen, estas tri daŭrigindaj projektoj elvenantaj de 2015:

-Don Kihoto en elektronika versio (profitante la 400an datrevenon de la eldono de la dua parto de la romano).

- Solenado de la 80a datreveno de la forpaso de Valle-Inclán: prezento de la ĵus eldonita traduko de *Bohemiaj lumoj* kaj de la jam antaŭ jaroj eldonita *Tirano Banderas*.

- Renovigo de la broŝuroj de HEF.

<u>PRESUPUESTOS 2016</u>			
<u>GASTOS</u>		<u>INGRESOS</u>	
<u>2. Aprovisionamientos</u>		<u>1. Ingresos Afectos a la Actividad</u>	
(Compra de libros, de material didáctico y variación de existencias)	400,00 €	Prestaciones de Servicios (Venta de libros, cursos...)	600,00 €
		Cuotas	5.500,00 €
<u>4. Otros Gastos de la Actividad</u>		Congreso	6.000,00 €
Servidor y Dominios Internet	1.200,00 €		
Reparaciones y Mantenimiento	100,00 €	<u>5. Otros Ingresos de la Actividad</u>	
Primas de Seguros	120,00 €	Subvenciones y Donaciones	2.000,00 €
Comisiones Bancarias y Similares	300,00 €		
Cuota UEA	190,00 €		
Boletín	2.800,00 €		
Congresos	6.000,00 €		
Otras Campañas y Publicidad	1.000,00 €		
Suministros (electricidad)	250,00 €		
Teléfono	450,00 €		
Correo	200,00 €		
Comunidad Vecinos	900,00 €		
Material Oficina	100,00 €		
Gastos Varios	90,00 €		
TOTAL GASTOS	14.100,00	TOTAL INGRESOS	14.100,00
		RESULTADO DEL EJERCICIO	0,00

LA 28a DE FEBRUARO FINIĜAS LA UNUA PERIODO POR ALIĜI AL LA KONGRESO

POR ALIĜI, VIZITU <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso> KAJ PLENUMIGU LA "ALIĜILO"-N.

NI JAM POVAS ANONCI PARTON DE LA PROGRAMO

Krom la jam anoncita partopreno de la Ibera Skolo de literaturo, la spektaklo *Vivu la teatro!* kaj la omaĝo al Jorge Camacho, la partoprenantoj de la 75a Hispana Kongreso de Esperanto povos aŭskulti prelegojn de Tonjo del Barrio, Kani, Suso Moinhos, Miguel Fernández, Liven Dek, Jorge Camacho, István Ertl, Xavi Alcalde, Duncan Charters, Mikaelo Bronŝtejn, Irek (*Varsovia Vento*).

La jubilea Hispana Kongreso de Esperanto omaĝos la literaturon, la poezion, la muzikon kaj la teatron en Esperanto. Georgo Handzlik kaj Sasa Pilipovic prezentos en Herrera del Duque kiel monda premiero la teatraĵon *La Kredito*.

La juna ĉampiono de ŝakludo Íñigo López Mulet invitos vin ludi kontraŭ li en multnombra samtempa ŝakmatĉo.

Vi povos danci kaj kanti danke al nia programo de koncertoj. JoMo, Asorti, Ĵomart kaj Nataŝa, kaj la regiona grupo Acetre amuzigos vin ĉiuvespere.

Pri la ekskursoj, vi povos viziti la faman vilaĝon kaj monaĥejon de Guadalupe, kaj la ĉefurbon de Ekstremaduro, Mérida.

Sed ĉio ĉi estos nenio sen vi, kara samideano. Esperanto bezonas esperantistojn. Ni bezonas vin. Ne perdu la okazon partopreni en la jubilea Hispana Kongreso de Esperanto. Aliĝu antaŭ la fino de la unua periodo. Vi ne bedaŭros



LOGADO DUM LA KONGRESO

En la retejo de nia venonta Hispana Kongreso de Esperanto, en Herrera del Duque, ĉe <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/logado> oni jam disponas je informado pri la eblecoj pri gastigado en la urbo, en kiuj eblas jam rezervi vian ĉeston dum tiu semajno. Jen la ĉefaj eblecoj:

- | | |
|---|---|
| 1) Hostal Restaurante Paco
Avda. Comendador Arias Pérez, 12
Tlf. 924 650 801
924 642 202 | 2) Hostal Restaurante Carlos I
Avda. Comendador Arias Pérez, 26
Tlf. 924 650 871
654 450 905 |
| 3) Hostal Restaurante "El fogón de la Felisa"
Paraje los Nogales.
Tlf. 924 650 148
699 171 515 | 4) Casa Rural "La Huerta de los Nogales"
Avda. Juan Carlos I, 1
Tlf. 686 798 848 |
| 5) Apartamentos rurales "Los Aperos"
Carretera de Peloche
Tlf 616 055 691 | 6) Campamento "Alfredo Rivas"
C/ Alonso Sotomayor s/n
Tlf. 927 241 189
667 756 818 |

Plej rekomendinda estas 1 kaj 2)

Ni ankaŭ povas anonci ke por la Kongreso ni disponos je junulargastejo, kun gastigkapablo por 40 homoj. Tute nove renovigita, kun novaj litoj, nova fridujo, novaj banejoj. En Peloche, vilaĝo de la sama municipo Herrera del Duque, apud la laga plaĝo... kaj tute senpaga por la partoprenantoj.

Skribu al la organizantoj ĉe la adreso kongreso@esperanto.es se vi havas dubojn aŭ bezonas konsilojn.

VIZITO AL GUADALUPO

La 3an de oktobro la Loka Kongresa Komitato de la 75 Hispana Kongreso de Esperanto kaj la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio vizitis la urbon kaj la monaĥejon Guadalupe (Guadalupe, Ekstremaduro). Al tiu ĉi loko direktiĝos la ĉefa ekskurso de la kongreso, kiu okazos komence de julio 2016, kaj kies ĉefa sidejo estos la proksima urbo Herrera del Duque Oni povas vidi kelkajn fotojn en nia profilo de Fejsbuko.

La monaĥejo de Guadalupe estas vera juvelo de la hispana arĥitekturo, kun escepta riĉeco kaj havaĵo, kaj kun granda signifo historia kaj religia, ne nur en Hispanio, sed ankaŭ en multaj landoj de Latinameriko. Pri la urbo kaj la monaĥejo eblas legi tre detalajn artikolojn en la esperanta Vikipedio, pli kompletajn ol eĉ tiuj de la hispanlingva versio.

FUNDACIÓN ESPERANTO

INFORMADO PRI 2015

La helpoj programitaj por 2015 estis anoncataj kaj publikigataj en n-ro 408 de "Boletín" (okt-dec.2014) de HEF.

Ni ricevis diversajn petojn, eĉ el eksterlando. Tamen, en diversaj kazoj ni ne ricevis respondojn kiam ni petis konkretigojn kaj detalojn. Krome, ni disponis je tre modesta kvanto por helpoj. Sekve, ni decidis helpi al nur unu asocio.

Tial, fine oni destinis (lastajare) al Grupo Esperantista de Bilbao 300 € pro elspezoj pri instalado de lifto en la domo de la sidejo.

En 2015, 400-jara datreveno de la publikigo de la 2-a parto de Kifoto, Fundación Esperanto (kiu eldonis la esperantan version) kontaktis kun HEF cele al finpretigo de elektronika eldono.

Krome, kiel kutime, en nia sidejo estis organizitaj E-kursoj por komencantoj senpage.

PROJEKTOJ POR 2016

Helpoj por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpos diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2016.

Lastatempe, la elspezoj kreskis kaj la enspezoj malpliĝis. Tial, la tuta kvanto disponebla por helpoj estos 300 €.

Lorenzo Noguero

(Sekretario de "Fundación Esperanto")



FUNDACIÓN
ESPERANTO

19-a Andaluza Kongreso de Esperanto en Jerez de la Frontera (Hispanio)

La lastan semajnfino de oktobro 2015, pli ol 60 homoj alvenis en la urbon Jerez de la Frontera, kie okazis la 19-a Andaluza Kongreso de Esperanto, kun la celo renkontiĝi kun gesamideanoj el la tuta regiono, sed ilia surprizo estis grandega, ĉar ĉestis kaj partoprenis homoj el landoj kiel: Usono, Sud-Koreio, Portugalio, Belgio, Svedio, Nederlando, Litovio, Kroatio kaj Francio, kaj la ceteraj el kelkaj regionoj de la duoninsulo Iberio. La vic-urbestro inaŭguris la kongreson kaj prononis kelkajn vortojn en Esperanto. Post ĉi inaŭguro sekvis alia, ĉi foje temas pri strato, ĉar oni dediĉis straton al la unua esperantisto de Jerez, "Pedro Naranjo Terán". Oni luis buson por alveni en la straton, kiu troviĝas relative malproksime de la kongresejo, sed en bela kvartalo. La evento okazis en harmonia etoso, ĉar la kongresejo estas malgranda, sed belega salono de la mezepoka palaco de Villavicencio, ene de la Alkazaro de Jerez, ĉirkaŭata de ĝardenoj kaj monumentoj, vizitebla sub pago de enirbileto, kompreneble la geesperantistoj eniris senpage montrante la kongres-identigilon. La urbo Jerez de la Frontera estas tre konata en la mondo pro la fama vino Ŝereo kaj aliaj firmaoj ne malpli bonaj. En tiu urbo estas la plej fama Rajd-Arta Skolo de Hispanio kaj nombraj monumentoj.

La moto de la kongreso estis "Esperanto kaj Universitato", kaj kompreneble, la prelegantoj estis, precipe universitataj profesoroj, inter ili elstaras: Duncan Charters, el Usono, Principia College Universitato, Elsah, Illinois, kiu prelegis pri "Universitata instruado de Esperanto: spertoj atingoj kaj perspektivoj", "Evoluo en la instruado de Esperanto, kiel ni plej efike instruoj kaj lernu nun?" kaj "Kial legi literaturon en Esperanto?", sekvata de ronda tablo por komuna diskutado. La hispana profesoro de la Universitato de La Laguna, Alejandro F. López de Vergara Méndez, prelegis pri "La organizado de la kurso de Esperanto kun akademia valoro en la hispanaj universitatoj". Ankaŭ menciindas la prelego de la D-rino Rafaela Uruña Álvarez, profesorino pri Internacia Juro en la Universitato de Valadolido, kiu prelegis pri "Problemoj el la internacia jura vidpunkto rilate la maron ĉirkaŭ Ĝibraltaro". S-ino Fátima Jiménez García unu el la tri hispanoj, kiuj studas Kurson de Esperanto kaj Interlingvistiko en la Universitato de Poznano, prelegis pri sia sperto kaj gvidis interesan atelieron pri "Mikroficiaĵoj".





formas la t.n. "Internacia Atoma Tempo". Nia Asocio AEU tradukis kaj printis la oficialan broŝuron de tiu Instituto por disdoni inter la ĉeestantoj.

La luda parto konsistis el ekskursoj al la urbo San Fernando kie staras la plej fama Reĝa Instituto kaj Observatorio de la Mar-Armeo de Hispanio kiu estas la tria plej grava de Eŭropo, kie ni miris grandan historian bibliotekon kaj la atomajn horloĝojn, kiuj estas la fundamente ilaro por difini la horon de Hispanio nomita UTC-ROA. Ekde la jaro 1976 la ĝusta horo estas elsendita el San Fernando pere de radio-stacio kaj de telefono. Kompreneble la Instituto subtenas kopeerajn rilatojn kun aliaj oficialaj horloĝoj de la tuta mondo kaj ĉi ĉio

Tuj poste oni tagmanĝis en restoracio por daŭrigi la ekskurson trajne al la urbo Kadizo, kie ni trairis promene la centron, kiu estas arkitektura juvelo. Pri Kadizo nia Asocio ankaŭ tradukis belan broŝuron.

La plej bongusta afero estis la Ŝerea vino, ĉar ni vizitis vinkelon, kie ni lernis pri la elabrado de vinoj kaj gustumis kelkajn, krom vizito al la ĉeval-grego de tiu entrepreno kaj la muzeo pri historiaj kaleŝoj kaj gravuraĵoj de la hispanaj pentristoj Picasso kaj Miró. Nia



Asocio ankaŭ personecigis botelon da vino kun la nomo Esperanto kune kun la moto kaj dato de la kongreso.

La postkongresa ekskurso okazis en la urbo Sanlúcar de Barrameda, elfluejo de la rivero Gvadalkiviro kaj Nacia Natura Parko Donjana (Doñana).

Ángel Arquillos



PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio

ZAMENHOFA TAGO EN SEVILO

Ĉi-jare la andaluzia esperantistaro renkontiĝis en Sevilo por festi la Zamenhofan Tagon. Aranĝita de la kreskanta Sevila Esperanto-Asocio, oni organizis la pasintan 12an de decembro belegan kaj allogan viziton al la tegmento kaj terasoj de la Katedralo en Sevilo. Ĉu vi scias, ke tiu ekstera parto de la Katedralo estas tiel ne-kredeble bela kiel la interna parto mem? Dudeko da geesperantistoj promenis tra ekstreme mallarĝaj koridoroj, supreniris



mallumajn ŝtuparojn kaj trapasis kaj konis la plej misterajn angulojn de la Sevila Katedralo. Temis pri du horoj da vojaĝo tra Mezepoko kiu finiĝis pere de komuna fotografiaĵo en la plej alta pinto de la Katedralo, tuj apud la Hiraldo.

Poste, ni renkontiĝis en tipa restoracio, jaron post jaro ĉeestas pliaj gesamideanoj kaj espreble venontjare, ni povos sukcese organizi komunan Zamenhofa Feston kun geesperantistoj de la ceteraj andaluziaj urboj.

La Zamenhofa Festo ne finiĝis tiam, ĉar la 15-an de decembro mem Sevila E-Asocio aranĝis nokto-manĝon, al kiu ĉeestis ankaŭ malagaj gesamideanoj, okaze de tiu akto nia sevila amiko Jerónimo paroladis esperant-lingve pri la taŭgeco de la internacia lingvo.

DONACO AL LA SEVILA ESPERANTISTARO

Familiano de José María ARIAS DE REYNA donacis al Sevila Esperanto-Asocio kolekton de libroj kaj revuoj en esperanto. S-ro ARIAS DE REYNA estis delegito de Universala Esperanto-Asocio en Sevilo dum la 5-a jardeko de la pasinta jarcento. Tiutempe, nur li kaj nia ne-forgesebla samideano Rafael FIOL PAREDES, estis la solaj esperantistoj en la urbo kie la movado preskaŭ malaperis post la civila milito. Bofilo de S-ro ARIAS DE REYNA konis la ekziston de Sevila Esperanto-Asocio pere de interreto kaj rapide decidis donaci tiun materialon en esperanto al la asocio, temas pri 60 libroj kaj 50 publikaĵoj.

ARAGONO

La ekspozicio de HEF (per paneloj) pri Esperanto denove aperis en Zaragozo. Ĉi-foje, danke al la agado de Eduardo Berdor, ĝi estis montrata en la publika urba biblioteko *Benjamín Jarnés* kurprelego la 27-an de novembro de Eduardo pri Esperanto.

Sabate, la 12-an de decembro okazis frateca tagmanĝo en urbocentra restoracio.

La 15-an de decembro estis nia kerna tago. Matene, la regiona radio-stacio "Aragón Radio" faris intervuon al Lorenzo Noguero dum la programo "Despierta Aragón!" (Vekiĝu Aragono!). Vespere, aparte agrabla kaj memorinda estis la celebrado en la sidejo de *Frateco*. Alvenis multe da geamikoj kio igis la momenton pli speciala. Dankon, Jaime, Santiago, Emilio, M^a Cruz...! Kaj Antonio Marco faris prelegon pri la loko kie nuntempe troviĝas la sidejo de *Frateco* kaj Fundación Esperanto [vidu pri tio lia artikolo en "Boletín" sep.-okt. 2000] kaj plibeligis la momenton per triobla "E-spektaklo": proze, poezie... kaj kante:

(...)
Bildoj de la scen',
horoj de ĉagren'
pensoj fabrikas nur nuloj
por tia am', ne ekzistas balzam'...
(...)

Lorenzo Noguero

MADRIDO

SUKCESA ZAMENHOF-TAGO EN MADRIDO

Por festi la librotagon kaj naskiĝan datrevenon de Zamenhof, la 12an de decembro, sabate, kiel anoncite, MEL luprenis aŭlon en la kultura Centro Sociocultural Mariano Muñoz, en la kvartalo Usera, strato Cristo de Lepanto.

La programo komenciĝis je la 11:00 per bonveniga saluto de la prezidanto de Esperanto-Liceo de Madrid, Manuel Parra.



Je la 11:30 Miguel Fernández prezentis kelkajn novajn librojn, inter kiuj la traduko de “Bohemiaj lumoj” (pri tio vidu apartan artikolon).

Poste, Jorge Camacho prezentis kelkajn poemojn el sia nova, baldaŭ eldonota, poemaro.

Eksterprograme, profitante la ĉeeston de nia ekstremadura samideano José María Salguero (Kani), li prezentis la venontan hispanan kongreson de Esperanto, okazontan komence de julio en la urbo Herrera del Duque.

Je la 13:00 disvolviĝis teatra legado: "La participoj", komedieto de Marjorie Boulton, fare de la gelernantoj el la nuna kurso de esperanto. Eĉ se temis pri amatora, lega prezentado, la ĉeestantoj ĝuis la komedion kaj sincere aplaudis la meritplenan provon.

Je la 14 ni ĝuis komunan tagmanĝon en la halo de la kulturejo, aranĝata de la tiea kafejo.

Post la manĝo la programo plu antaŭen-iris per prezentado fare de Alex Escobedo pri la reta esperantista mapo kaj per debato pri varbado. Poste Felix Jiménez prelegis pri "ZEOj en Varsovio kaj surprizo en Istanbul".

Je la 17:00 okazis spektaklo de magio fare de nia italia sam-ideano Massimo Collo, nun loĝanta en nia urbo, kaj poste Juan del Castillo gvidis tablo-ludojn.

Je la fino, kelkaj parto-prenantoj ĉeestis hispan-lingvan teatron prezenton en la kulturcentro. Kiel decas pro la tago, dum la tuta tago pretis malgranda libroservo. Entute preskaŭ trideko da esperantistoj ĉeestis la feston dum la tago, kaj ĝenerale ĝuis la programon.

MADRIDA MAGISTRATANO AŬSKULTAS POEMOJN EN ESPERANTO

La internacia junulargastejo San Fermín, de Madrido, estas konata de ni esperantistoj pro la simpatio montrata de ĝiaj gvidantoj al nia afero. Tie okazis i.a. la 9a IRO (Iberia Renkontiĝo) en 2013. Ankaŭ la najbaroj de la kvartalo San Fermín rigardas la gastejon kiel aktiva centro de kultura agado. Unu el la plej malnovaj, konstantaj kaj fervore probatalataj depostuloj de la najbaroj estas la kreo de biblioteko, kion antaŭaj aŭtoritatoj neglektis.



Nun la nova magistrato aprobis la kreon de la sopirata biblioteko, des-tinante monon por la projekto. Por pri-festi tiun bonan novaĵon, la najbararo aranĝis mo-destan sed vibro-plenan feston. La 22an de novembro, ĝuste sur la parcelo, sur kiu oni konstruos la bibliotekon, pluraj muzikistoj, kantistoj kaj poetoj faris prezentojn. Inter ili, nia poeto Miguel Fernández deklamis kaj kantis kelkajn poemojn en la hispana kaj en Esperanto.

Ok esperantistoj ĉeestis inter la publiko. Por la unua fojo post pli ol dudek jaroj da batalado por ke oni kreu bibliotekon en la kvartalo, venis oficiala reprezentanto de la madrida magistrato. Temas pri Celia Mayer, magistratanino pri kulturo. Ŝi vere gavis aŭskultante Miguel deklami kaj kanti en Esperanto. Sendube, per tiu ĉi agado ni trabatis al ni la vojon por iniciati interesajn rilatojn kun la nuna madrida magistrato.

VIZITOJ AL GRUPOJ

BILBAO



Dum la lastaj monatoj de 2015 la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, ĝuis la ŝancon viziti kelkajn klubojn de Esperanto de nia lando.

La 18-an de oktobro li kunvenis en Bilbao kun membroj de la *Grupo Esperantista de Bilbao*, en ties sidejo, inter ili kun nia veterana Eduardo Larrouy, aktiva kaj klarvida kiel ĉiam (vidu la apudan foton).

VALENCIO

La 18-an de novembro la vizito okazis ĉe la esperantista grupo de Valencio, kaj, kiel decas en tiuj ĉi tempoj, ne povis manki memoraĵo, kun memfoto ("selfio"), en kiu partoprenis ankaŭ nia kara Majstro!



SEVILO

La 26-an de novembro la prezidento de HEF vojaĝis al Seviljo, kie li renkontiĝis kaj kunmanĝis kun la lokaj samideanoj. Li tie povis konstati ke la sufiĉe multnombraj esperantistoj de la urbo iom post iom reorganiziĝas kaj komencas aranĝi agadojn kune. Oni informis al li pri venontaj kursoj en la kultura centro "Domo de Sirenoj" jam en januaro, kaj pri la agadoj por la Zamenhofa-Tago.

En la tri kazoj oni diskutis kelkajn problemojn komunajn al la lokaj Esperanto-grupoj, kaj la manieron kreskigi ilian altiron por la novaj generacioj kiuj memstare lernas la internacian lingvon, plejofte per la reto.

INSTITUCIA AGADO

DONACADO DE LA NACIA HEREDAĴO



Hispana Esperanto-Federacio ricevis donacon de informadika materialo, fare de la Oficejo de la Nacia Heredaĵo (ŝtata institucio zorganta pri monumentoj de Hispanio plejparte rilataj al la monarĥio), en ties kampanjo de apogo al neregistaraj organizaĵoj.

En la foto, la prezidantoj de la Federacio kaj de Madrida Esperanto-Liceo, José Antonio del Barrio kaj Manuel Parra, kun la respondeculo de la kampanjo David Trigo, ankaŭ esperantisto, en la oficejo de la Reĝa Palaco de Maadrid.

TEJO REPREZENTITA EN MADRIDO

Saŝa Murr vizitis Madridon de la 26a de novembro ĝis la 1a de decembro. Ŝi, kune kun la prezidanto de TEJO kaj tiu de la ĉefa esperanta junularo partoprenis en Forumo de Eŭropaj Junularoj okazinta dum tri tagoj Madride. Tie TEJO povis defendi la lingvajn rajtojn dum rezolucioj kaj babilrondoj kaj same kundividi opiniojn kun aliaj organizoj. Kompreneble ili ofte klarigis amike pri nia pontlingva alternativo uzata de esperantistoj kaj substreke de TEJO. Fruktodonaj rilatoj estis kreitaj por plufirmigi ilin ĉe la venontjara Forumo.



EŬROPA TAGO DE LINGVOJ

La 26an de septembro, sabate, la Esperanto-movado en Hispanio aliĝis al la kunmemoro de la Eŭropa Tago de Lingvoj, ĉiujare organizata de la Konsilio de Eŭropo, per prelego pri Esperanto en nia sidejo, en kiu Juan del Castillo prezentis ankaŭ la kurson kiu nun komenciĝas. Lin prezentis la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio. Ĉeestis deko da interesitoj.




EKSPOZICIO DE TRADUKOJ DE *DON KIĤOTO*

Dum aŭgusto kaj oktobro oni montris ekspozicion pri tradukoj de *Don Kiĥoto* en la biblioteko de la Instituto Cervantes:

http://www.cervantes.es/FichasCultura/Ficha100831_00_1.htm

En ĝi troviĝis ekzemplero de *Don Kiĥoto* en Esperanto (en la foto, apud la latina versio)

La ekspozicio estas unu el la agadoj de la celebrado de la kvarcenta datreveno de la dua parto de *Don Kiĥoto*, al kiu ankaŭ HEF kontribuas.



AUGUSTO EN LA PANTEONO

Augusto Casquero estis elektita al la "Panteono", la listo de elstaraj instruistoj, kiujn nomumas la retejo edukado.net. Li estas la unua el la listo devenanta el Hispanio. Legu la retan informon ĉe la retpaĝo <http://edukado.net/novajhoj?id=592>

Augusto instruis Esperanton ne nur en pluraj urboj de Hispanio, sed ankaŭ amplekse en landoj kiel Pollando, Ĉinio kaj Vjetnamo.

Hispana Esperanto-Federacio, kies prezidanto li estis inter 2005 kaj 2008, varme lin gratulas.



ESPERANTO EN REVUO PRI STUDIOJ PRI LA PACO

La numero 24 de la revuo *Por la paco*, eldonita de la Internacia Kataluna Instituto por la Paco enhavas artikolon pri la pacismaj influoj de la esperanta movado, precipe en la periodo proksima a la Unua Mondmilito. La aŭtoro estas Javier Alcalde, kaj la teksto estas legebla en la lingvoj kataluna, hispana (kastilia) kaj angla en ties retejo: http://www.icip-perlapau.cat/numero24/articles_centrales/article_central_5/

La serĉado de la paco, kaj la neperforto, estis trajtoj karakterizaj de nia movado, kaj unu el la ĉefaj celoj por la lernado de nia lingvo, ĉefe en tiu periodo de la lingvo. Pri tiu rilato inter Esperanto kaj neperforto, Javier verkis jam antaŭe alian ampleksan artikolon, kiun ni publikigis en nia retejo.

Ni profitis la okazon ankaŭ por rememorigi en nia hispanlingva retejo la akceptemon de la movadanoj en krizoj kaŭzitaj de la militoj. En Hispanio estis tre grava la agado por gastigi infanojn el Aŭstrio, kiuj suferis gravajn kondiĉojn tuj post la Unua Mondmilito, kaj kiujn oni akceptis en hejmoj de esperantistoj, ĉefe en Zaragozo kaj en iuj malgrandaj urboj de Valencio kaj Katalunio. Pri tiu historia epizodo aperis kelkaj informoj en diversaj ĵurnaloj de tiuj regionoj, dum la monato septembro.

ESTAS PRETIGATA LA HISPANLINGVA VERSIO DE DUOLINGO

La kurso pri Esperanto en la retejo por lernado de lingvoj Duolingo fariĝis la granda surprizo de la jaro 2015. Jam pli ol 250.000 homoj enskribiĝis en la kurso por lerni nian lingvon el la angla, kaj multaj el ili aperas iom post iom en la rondoj, grupaj kaj virtualaj.

Post tiu sukceso, pretiĝas nun novaj versioj, kaj la unua estos tiu por hispanparolantoj. Preparas la kurson Chuck Smith kaj la prezidanto de HEJS Alex Escobedo, kaj pliaj helpantoj povas sin proponi en la retejo.

Oni esperas ke ĝi pretos post proks. duonjaro ĝi pretos. Interesitoj povas jam nun enskribiĝi por ricevi atentigon, kiam la kurso enretos. Jam pli ol milo da homoj anoncis sin ĝis nun.

PREZENTITA LA EŬSKA-ESPERANTA VORTARO

La sabaton 17an de oktobro estis unuafoje prezentita en la esperantista medio, en restoracio en Lojolo (parto de la municipo Aspejito, Gipusko), la unua granda vortaro dulingva kaj ambaŭdirekta inter la eŭska kaj Esperanto, kun la ĉeesto de ĝia aŭtoro Aitor Arana. La impona libro, kun pli ol 740 paĝoj, estas la kulmino de multaj jaroj da laboro, kaj fariĝos de nun referenca verko por la parolantoj de ambaŭ lingvoj.



Pri la revizio zorgis la nederlanda profesoro Wim Jansen kaj pri la eldono, la Eŭska Esperanto-Asocio.

La aŭtoro, Aitor Arana, estas tre konata verkisto en la eŭska lingvo, gajninto de multaj literaturaj premioj en tiu lingvo. Li verkis originale ankaŭ en Esperanto, sed li estas pli konata kiel tradukisto, interalie de verkoj de Bernardo Atxaga. Li aŭtoras ankaŭ lernilon de Esperanto por parolantoj de la eŭska, kaj pretiĝas nun metodon por lerni la eŭskan per Esperanto.

Post tiu ĉi unua prezentado, direktita specife al la eŭskaj esperantistoj, aliaj estas antaŭvidataj por la ekstera publiko.

La verko estas aĉetebla jam en la Libroservo de UEA kaj baldaŭ en aliaj libroservoj kaj lokaj librejoj.

ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO FINIĜIS – ZAMENHOF OMAĜOTA

La 38-a Ĝenerala Konferenco de Unesko finiĝis la 18-an de novembro post dusemajna laboro en la sidejo de la monda organizaĵo en Parizo. Inter la aprobitaj temoj troviĝas la listo de internaciaj datrevenoj kun kiuj la organizaĵo povas esti "asociita" dum la periodo 2016-2017.

Unu el la 53 kunmemorotaj datrevenoj dum tiuj datoj estos la 100 datreveno, la 14an de aprilo 2017, de la morto de L.L. Zamenhof. Propono pri tio estis farita de Pollando, kun subteno de Germanio kaj Slovakio. Temas pri plia rekono de Unesko al Zamenhof post tiu okazo de la 100-a datreveno de lia naskiĝo, kiam li estis proklamita unu el la grandaj personecoj de la homaro.

Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialan statuson ĉe Unesko ekde 1954, estis reprezentita de kvar observantoj. Hazarde samtage, la 5-an de novembro, kiam estis akceptita la aŭspiciado de la Zamenhof-datreveno, UEA havis tempon ĉe la budo por ne-registaraj organizaĵoj, ĉe kiu la UEA-reprezentantoj povis disdoni informilojn kaj respondi demandojn pri Esperanto kaj la agado de UEA.

ELDONITA LA TRADUKO DE “BOHEMIAJ LUMOJ”



Dum tiuj ĉi jaro 2016 ni kunmemoros la 150an datrevenon de la naskiĝo kaj la 80an de la morto de Ramón María del Valle-Inclán, unu el la ĉefaj verkistoj de la literatura sceno en Hispanio en la komenco de la 20-a jarcento, kaj kiel omaĝo ni povas anonci ke jam disponeblas la traduko en Esperanto de lia ĉefverko, la teatraĵo "Bohemiaj Lumoj".

La traduko ŝuldiĝas al la laboro de nia konata poeto kaj tradukisto Miguel Fernández, unu el la plej gravaj membroj de la tiel nomata Ibera Skolo, tradukisto ankaŭ de Federico García Lorca kaj de multaj aliaj literaturistoj, ĉefe sed ne nur el Hispanio.

Pri la eldono respondecas Madrida Esperanto-Liceo, kun la kunlaboro de SAT-en-Hispanio. La libro estas la numero 11 de la kolekto "Hispana Literaturo", promociita de Hispana Esperanto-Federacio.

La libro estis unufoje prezentita dum la celebado en Madrido de la Tago de la Libro en Esperanto. La 21-an de decembro estis organizita alia festeto por adiaŭi la jaron en la sidejo de HEF, kie Miguel deklamis kaj klarigis iujn pecojn de la teatraĵo. Pri la prezentado eĥis la ŝtata radio Radio Nacional, kiu informis en iuj programoj pri la libro.

Ekde la komenco de la jaro la verko estas disponebla en la sidejo de HEF. La ĝenerala prezo estas 10 eŭroj. Specialan prezon de 8 eŭroj ĝuos la membroj de MEL kaj tiuj, kiuj ĝin antaŭmendis dum la Zam-festo. La ekstermadridaj esperantistoj kaj asocioj povas mendi ekzemplerojn kontaktante la Liceon.



FINFINE BOHEMIAJ LUMOJ VIDIS LA LUMON

“*Luces de bohemia* (Bohemiaj lumoj) estas por mi la plej bona teatraĵo en la hispana lingvo kaj unu el la plej gravaj verkoj en la historio de la hispana literaturo. Ĉu mi troigas? Eble jes. Ĉu ne preferindus nuanci tiel drastan aserton? Tute ne. Pri ĉi majstraĵo mi nek povas nek volas paroli senpasje kaj senpartie. Jam de mia konatiĝo kun ĝi, mi ne sukcesis eskapi el ĝia mirinda envulto. Feliĉe! Kiomfoje mi plonĝas ĝiasinen, ĝi envolvas min en sian simfonion de paroloj kaj de homoj kaj de faroj... kiuj instruas min, hispanon multflanke fremdan al mialandaj kutimoj kaj moroj, pri tio, kion signifas hispani”.

Tiel komenciĝas mia enkonduko en ĉi verkon. Ampleksa kaj nepra enkonduko en la biografion de la aŭtoro, Ramón del Valle-Inclán (1866-1936), en la teksbazon de lia ĉefverko kaj en la epokon, kie ĝi disvolviĝas. Ĉar, se la tolstoja *Milito kaj paco* estas superba friso de deknaŭjarcenta rusa historio, *Bohemiaj lumoj* estas superba friso de dudekjarcenta hispana historio, kies ĉefajn ŝlosilojn la leganto devas posedi por traĝui la tutan intrigon.

Ĉi-verke la aŭtoro inaŭguris novan literaturan ĝenron nomatan esperpento, resumeblan en jenan ekvacion: esperpento egalas dialektikan sintezon de tragika kaj groteska.

Traduki *Luces de bohemia* konstituas grandan defion pro la simpla fakto, ke ĝi netradukeblas. Nu, ĝuste tial mi entreprenis ĝian esperantigon. En ĝi uzatas plej diversaj slangoj, ĵargonoj, parolturnoj... el plej diversaj sociaj tavoloj de la dudekaj jaroj, lingvaĵoj nekompreneblaj eĉ por nuntempaj hispanoj. La tuta traduko plenas de notoj kaj klarigoj, dank’ al kiuj eĉ hispanaj e-istoj, kiuj neniam trae komprenis la verkon, povos nun ĝin traĝui.

Ja 95 jarojn post ol ĝi naskiĝis, *Luces de bohemia* restas viva en la memoro de la madrida popolo! Ĉiun 26an de marto, la antaŭvesperon de la Internacia Tago de la Teatro, eblas partopreni en *La noche de Max Estrella* (La nokto de Makso Stelo). Ĝi konsistas en grupa irado tra la vojo sekvita de la protagonisto Makso Stelo kaj ties *alter ego* (alia memo), Sinjoro Latino de Hispalis, en la senmorta verko de Valle-Inclán. Simila aranĝo havas lokon en Dublino, ĉiun 16an de junio, sub la nomo *Bloomsday* (Tago de Bloom) honore al Leopold Bloom kaj Stephan Dedalus, protagonistoj de *Uliso*, de James Joyce, verko multflanke ĝemela de *Bohemiaj lumoj*. Nu, niaflanke, ĝis nun ni madridaj esperantistoj organizis du tiuspecajn aranĝojn sub la nomo *Bohemiaj noktoj*. En la fino de la libro, mi priskribas ilin, reproduktas la sciigojn surloke faritajn pri stratoj, personoj, monumentoj... la deklamitajn poemojn, la tekstojn de la kantitaj kantoj...

Ankoraŭfoje Esperanto sukcese transsaltis la barieron de ĉi nova defio al siaj kapabloj beletraj. Ankoraŭfoje ĝi ebligis traduki netradukeblan majstraĵon el la eŭropa literaturo de la dudeka jarcento. Mi feliĉas.

(Ramón del Valle-Inclán, *Bohemiaj lumoj*, en traduko de Miguel Fernández, n-ro 11 de la kolekto Hispana literaturo, Madrida Esperanto-Liceo, Madrido, 2015, 176 p., mendebla ĉe UEA-libroservo).

Miguel Fernández

POEZIA ANGULO

EL TIO, NIA PEĈO

Jen vi el la rubuoj viastrataj,
ŝarĝita per manĝaĵoj rehejmiĝas:
tri picoj, krom rostita kokidaĵo,
paro da kartonbrikoj da lakt' iom acida,
ses piroj en siropo
kaj du tomatoj ŝimaj...

Jen trezoro.

Vi manĝas unu picon kun kokidaĵo frida:
mankas elektro, gaso... Ĉi servojn interrompis
mastraro rabobirda,
ĉar vi ne pagis.

Ba!

Tio ĉe filmoj estas plej kutima.
Nu, tio manĝi frida l' kokidaĵon.
Jen kutim' distingita.
Tio pri l' gas', elektro, via senlaboreco,
estas fiaĵoj, kiujn la ŝtato ne evitas.
Vin ne iritas ĉi ideo. Poste
eliras vi vagadi en la urbo trankvila.
Sata kaj netuŝata! Amaso tumultema
“aliĝu, ne rigardu nin” alkrias.
Vi ne komprenas, kial nek por kio
vi devus do aliĝi al homoj tiel spitaj.

El tio, nia peĉo!, murmuris vi. Forvelas
ignorante, ke iam
vi perdis ion multe pli gravan ol elektro,
gaso, akvo, laboro... rideto ĝoj-esprima.
Vi perdis vian dignon,
esencan parton de la vivo nia.


Miguel Fernández

FORPASI NIA AMIKO DARÍO RODRÍGUEZ

La 14-an de oktobro forpasis en Madrido la veterana kaj tre aktiva esperantisto Darío Rodríguez López de Silva. Kvankam 84-jara (li naskiĝis en aŭgusto 1931), li estis tre agema ĝis somero, kiam li devis esti enhospitaligita, sed fine de septembro lia sanstato subite malpliboniĝis kaj li forpasis en la mateno de tiu tago.

La agado de Darío por Esperanto havis du apartajn fazojn. Pri la unua parto, servante al la renaskiĝo de la hispana movado post la milito, vi povas legi en la sekva artikolo de Antonio Marco.

En la 60-aj kaj 70-aj lia agado draste malpliĝis, ĉefe pro personaj kaŭzoj, kaj al tiu periodo li poste nomis (eble iom troige) sia kabeĝo. Tamen, post sia emeritiĝo li revenis al la movado kun rimarkinda forto. Malgraŭ sia aĝo li tre bone regis la retajn ilojn, kaj dediĉis sian aktivadon ĝuste al la partopreno en la unuaj retaj forumoj kaj al la interŝanĝo de novaĵoj de iuj partoj de la movado al la aliaj, super la landlimoj. Tiel, li fariĝis tre konata en internaciaj medioj, kiel atestas la fakto ke el ĉiuj partoj de la mondo venis montroj de kondolencoj kiam oni ekkonis lian forpason. Ĉiuj reagoj substrekas lian afablecon kaj helpemon, kaj tia li restos en ĉies memoro.



DARÍO RODRÍGUEZ LÓPEZ DE SILVA

Naskiĝinta en la jaro 1931. Li esperantistiĝis kiam li ankoraŭ estis tre juna, kaj mi konatiĝis kun li en la Kongreso de Terrassa, la unua Kongreso post la intercivitana hispana milito (t.e. la 12a Hispana Esperanto-Kongreso -1951).

Terrassa plenplene kontentige plenumis sian gastaman rolon, kaj la loĝantaro akceptis nin per klaraj elmontroj de simpatio kaj afableco, ne estis ja unuafoje ke Terrassa akceptis la esperantistojn, kaj laŭlonge de la historio de la urbo, oni povas rememori antecedentojn gravajn, kaj en multaj placoj kaj stratoj oni povis vidi sur balkonoj, girlandoj, ornamaĵojn, kaj verdajn standardojn... ĝuste kiel en ĉi tiuj tagoj. Jes, estis la granda festo de la esperantistoj, tiel longe atendita, kvankam ĉifoje, malgraŭ la kontento de la urbo, la hispana registaro amaris nian ĝojon, ĉar ĝis la lasta tago anoncita por la komenco de la Kongreso, ni ne ricevis la permeson por komenci ĝin... kaj kiam ni havis tiun permeson, ni ĝoje malfermis niajn debatojn; mi rememoras la multenombrajn proponojn por plifirmigi nian futuron. Inter la proponintoj estis juna madridano, Darío Rodríguez, kiu prezentis unu el la proponoj pri kotizoj, poste, kiam mi demandis pri la esperantisteco de tiu junulo, oni informis min, ke antaŭ ne longe li estis unu el la organizantoj en Madrido de Esperanto-Ekspozicio.

Antaŭ ol tiu evento kiun ni ĵus priskribis kiel la unua foje ke mi kontaktis kun Darío Rodríguez, okazis en 1947, la malfacila rekomenciĝo kaj fondo de HEF, kaj en 1949 la apero de "Boletín", en 1950 la elekto de nova HEF-estraro, kaj en 1951 tiu unua, HEF-Kongreso en Terrassa pri kiu ni jam priskribis je la komenco de tiu ĉi Kroniko en kiu mi konatiĝis kun nia amiko Darío.

En 1952, okazis interkonsento de pluraj hispanaj esperantistaj Societoj, por gvidi Esperanto-kursojn, kaj Darío Rodríguez estis la gvidanto de la Esperanto-kurso de Madrido. De tiu momento mi gardis en mia menso la elstarecon de tiu juna madrida esperantisto.

En 1953, fondiĝis oficiale pluraj esperantistaj societoj, inter aliaj tiuj de Bilbao kaj Madrido. En la fondo de tiu pri la baska ĉefurbo, intervenis la prez. Eŭgenio Lunate, Teodoro Elizondo, J.L. Muñorreyo, T. Apraiz, E. Larrouy, C. Olalla, Luis Otaola, J. J. Juanes kaj T. Bustos; kaj en Madrido estis López Herrero, generalo Perogordo kaj Darío Rodríguez: la leĝigo de tiuj du gravaj E-Centroj, iamaniere kuragiĝis aliajn hispanajn Societojn leĝigi la proprajn. La partopreno denove de Darío estis laŭdinda kaj oportuna.

Kaj senhalte, venis la Esperanta Kongreso de Bilbao en kiu nia bona amiko Darío kaj samideano Juan Bosch, el Valencio, estis elektitaj kiel protokolantoj. La Interkona Kunveno okazis en la luksaj salonoj de la "Nova Ateneo de Bilbao" kaj la Urbestro de tiu urbo, s-ro J. Zuazagoitia, prezidis la Malfermon per parolado kun sia familia stilo, kaj invitis al la kongresanoj per lunĉo. Alia agrabla programo estis la prezentado de baskaj dancoj: la txistulari muzikistoj ludis per fluto kaj tambureto unutona melodio kaj kelkaj paroj de junaj gedancantoj, en kolor-riĉaj kostumoj ĉarmis al la kongresanoj. Jes, la kongreso estis tre brila.

Kaj kun tiu ritmo venis, en 1954, la 15a Esperanto-Kongreso en Zaragozo, en kiu la nombro da aliĝintoj registris la plej alta de ĉiuj antaŭaj Kongresoj. En tiu kongreso de la Aragona ĉefurbo, agis entuziasme la sekretario de “Frateco” Antonio Marco kaj la sekretario de la O.K.K. Darío Rodríguez. Unu el la brilaj aspektoj de tiu Kongreso estis la Beletra Konkurso, kies Unuan Premion en originala poezio gajnis Marjorie Boulton, per la poemo “Printempo”, el kiu mi ne povas eviti la tenton prezenti al vi kelkajn strofojn, kiuj estis majstre legita de sinjorino Mimó:

PRINTEMPO

Birdoj min vekas per printempaj kantoj.
Birdoj eknestas, aŭ kun molaj plumoj
flirtas, facilaj, simplaj geamantoj.

Sub nunaj heloj kaj diversaj lumoj,
pluveloj pentras ĉielarkojn; kisoj
de ventoj flatas vangon, kaj parfumoj

de hiacintoj freŝas; Adonisoj
revivas ĉie en potenco dia;
brilas en herb' krokusoj kaj narcisoj

brilas la blanka flagro magnolia
en parko. Ĉie, ido aŭ burĝono
ekvivas. Ho! sezono ironia! Ktp.

La aliajn Premiojn gajnis: Salvador Gumá per “Pentristo”, la italo Vizenzo Musella, per “Ridetoj abundas”; en “Poezia Traduko” gajnis Amalia Núñez Dubus, Eŭsebio Maynar, f-ino Llonch kaj Luis Hernández... Tre bona Kongreso!

La sekvanta jaro, 1955, la Kongreso estis en Gijón (16 HEF-Kongreso) kiu organizis ankaŭ Literaturan Feston, en kiu s-ano Darío Rodríguez legis la Raporton de la HEF-estraro, kaj tuj la Prezidanto de la Beletra Konkurso, s-ro Mariano Solá legis la verdikton de la Juĝantaro, kiu proklamis kiel venkinton de la “Unua Premio en Origina-la Poezio” la s-anon Francisco Vila, per la poemo “Medalo”; la Subpremion al s-ano Augusto Nunes, pro lia verko “Kanto de l' Perfido”; la subpremion en Originala Prozo estis aljuĝita al la fraŭlino Pepita Criach pro ŝia verko “Benata estu Esperanto”. La “Unuan Premion pri Prozo Tradukita” oni aljuĝis al s-ano Luzo Bemaldo, pro lia traduko “Travivaĵoj de Cid” poemo de Rubén Darío, kaj la subpremion gajnis Luigi Minnaja pro lia traduko “La najtingalo” de José Espronceda. La “Unuan Premion pri Prozo Tradukita” al s-ano Antonio Marco Botella, pro lia traduko “La militestro de la ruĝaj manoj” de Bécquer, kiun legis pro foresto de la aŭtoro, Darío Rodríguez. La subpremion de sama branĉo gajnis Adolfo Tremouille... La aplaŭdoj al ĉiu leganto estis tondra. Honorajn menciojn meritis kelkaj elstaraj esperantistoj.

Je la fino de la kunveno, s-ano Darío Rodríguez proponis: “ke oni petu al la hispana Komisiono de la UNESKO, ke ĝi akceptu en tiu institucio reprezentanton de nia Federacio”.

Je la fino de la Kongreso, la HEF-Prezidanto d-ro Herrero petis al s-ano Darío Rodríguez legi la Rezolucion de la Kongreso, kiel pruvo ke nia Movado estas praktika kaj kultura, kaj celas tutmondan interkomprenon, same kiel l'UNESKO.

Kaj la sekvantan jaron, la 17a HEF-kongreso okazis en Barcelono, kaj oni elektis kiel gvidantoj de la kongresaj taskoj al la Prezidanto Miguel Arbona, el Majoroko, kaj kiel vicprezidanto la madridanon Darío Rodríguez, kiu tiel intense devis laboradi en tiu ĉi kongreso kaj antaŭaj, ke li petis iom da ripozo jam en la proksima Kongreso, almenaŭ ĝis tiuj venontaj.

Je la komenco de tiu ĉi kongreso, la kongresanoj kolektiĝis antaŭ la Barcelono Urbo-domo, kie devis okazi la solena Malfermo de la Kongreso, kaj efektive, je la 12a horo la geesperantistoj pleniĝis la historian kaj imponan salonegon de "Cent Konsi-listoj". Kiam la pedeloj ceremonie robovestite sukcesis fendi la homamason, la aŭtoritatoj kaj la esperantistaj estraranoj okupis la sidlokojn de la preziĉejo meze de impona silento: la Vicurbestro de Barcelono s-ro Bofarull invitis paroli prof. Llech-Walter, de UEA, kiu salutis la Kongreson, kaj sekve venis la vico de elstaraj hispanaj esperantistoj. La kongreso estis unu el la plej brilaj, kaj mankas paĝoj kaj paĝoj por priskribi la tutan Kongreson...



Kaj sen doni minimuman ripozo-tempon al tiuj kiuj ĝis tiam tre laboradis, venis la HEF-Kongreso de Madrido, kiu ricevis esperantistojn de ĉiuj hispanaj regionoj. La Kongreso okazis en la Sindikata Domo, ĝuste kelkajn metrojn fronte al la "Muzeo de l' Prado". Apenaŭ aperis en la preziĉejo la Prezidanto s-ro Figuerola, kiam komencis la Kongreso, kaj kiam ĉesis lia parolado kaj la aplaŭdoj, s-ano Darío Rodríguez, la agema sekretario, montris amason da leteroj kaj telegramoj kun salutoj de ĉiuj esperantistaj socioj de la lando kaj eĉ de eksterlando. Vane estas konfirmi ke ĉiu progra-mero estis firme debatita, kaj ekskursoj kaj vizitoj al la plej belaj palacoj de la ĉef-urbo plenumitaj.

En unu el la intervenoj de Darío li esprimis sian opinion pri la signifo kaj utilo de la lingvo Esperanto, kaj tial la esperantistoj bezonas gravan gazeton. Tiuj kaj aliaj gravaj aspektoj bezonataj de nia HEF-Asocio estis en la prelego de Darío varme aplaŭditaj de la kongresanaro. Ankaŭ interesa kaj brila estis tiu Madrida kongreso.

Kaj fine, nia amiko Darío sin donis ripozon, kaj de la jaro 1957 li saltis al la jaro 1964, tio estas, de la Kongreso de Madrido al tiu de Valencio, estis ja la jaroj kiu sin donis ripozon (kompreneble escepte de la lokaj taskoj en Madrido), en tiu kongreso de Valencio, Darío Rodríguez, prelegis en Esperanto pri Esperanto, kaj denove li insistis en sia opinio ke la Esperanta Movado bezonas gravajn elementojn, laŭ ekstera aspekto, egalaj al la plej gravaj nacilingvaj, kiu fariĝu digna ambasadoro de nia Movado kaj nia celo.

Kaj li ankaŭ konsideris necese, plialtigi la nivelon de la instrumentadoj de Esperanto.

Tiuj aspektoj de nia Movado li majstre pritraktis en perfekta lingvo, pro tio la kongresanaro varme aplaŭdis lin kiam li finis sian gravan disertacion.

Kaj denove Darío devis interveni en la kongresoj, ĉar tiu 33 Hispana kongreso okazis en Madrido, kaj en ĝi li devis denove prelegi pri la temo “Lingva haoso, bremsilo por la progreso”, en kiu li analizis kelkajn aspektojn de la hodiaŭa mondpanoramo, kaj la klopodoj kiujn ni, esperantistoj, devas fari por adaptiĝi al la novaj cirkonstancoj de la mondo. En tiu kadro, li studis la nunan lingvan situacion de la Unuiĝintaj Nacioj, aŭ la Eŭropa Merkato, kiujn li konsideris haosa, kaj substreki la regresemon, kiun tiu blinda politiko nereala por nia epoko generas. La oratoro estis entuziasme aplaŭdita je la fino de tiu interesa prelego.

En tiu kongreso en Madrido kiun ni priskribas, Darío Rodríguez legis omaĝan prezentadon de s-anoj Ernesto Guillem, Rafael Vizcaino kaj Luis Hernández, senditaj de d-ro Herrero, el Valencio...

Kaj ĉi tie finas la parto historia de Darío Rodríguez López de Silva, kaj nun mi invitas al iu ajn madridano fini tiun historion per la viveroj lastaj de tiu ĉi grava esperantisto, kiu jam forpasis en oktobro de tiu ĉi jaro, 2015, kaj kiun mi ekkonis en la jaro 1951, kaj kiun mi konsideras kiel ekzemplodonan esperantiston...

Antonio Marco Botella

Forpasis profesoro Herrera

Kun profunda doloro mi informas, ke la 22-an de oktobro de 2015 forpasis en Zaragozo nia samideano, profesoro José de Herrera, dum longaj jaroj membro de *Frateco*, veterana esperantisto, bonhumora kaj talenta homo, kiu fidele partoprenis en ĉiuj kunvenoj kaj bezonoj de nia Societo, kun trafikaj ideoj por nia esperantista afero, kiun meritoplene ni dediĉas poemeton:

Al nia kormemoro venas,
nia kara estimata profesoro!
kun parfumo de blankaj mirtoj,
kaj plej dolĉaj fervoroj,
tiujn kunvenojn en *Frateco*
kiam ni, ankoraŭ tre junaj,
projektiis niajn ekskursojn
al la Pirenea Montaro
kaj dum ni ĝuis la pejzaĝojn,
tre belajn kaj tre ĉarmajn,
praktikis la Esperantan lingvon
kaj tiel realigis niajn revojn
pri Homaro en harmonia
kaj dolĉa kunvivado !!!



Amiko Herrera, ni konsideris al vi ne kiel amikon sed eĉ kiel tre estimatan fraton...
Ĉiuj fratecanoj memoros vin ĉiam!!!

Antonio Marco Botella

LASTA-HORO NOVAĴO PRI ESPERANTA MUZIKO (VINILKOSMO)

BaRok-Projekto - Catalão (Goias, Brazilo)

La Brazilia bando **BaRok-Projekto** estis fondita de la gitaristoj **Rafael Milhomem** kaj **Muniz** en 2007. Ilia muziko estas tre melodia potenca metalroko kun karakterizaĵoj de la baroka, klasika, kaj folkloro muzikoj. En la komenco, la bando estis nur virtuala, kun unu aŭ du muzikistoj ludante diversajn muzikilojn en sia hejmsstudio. Ne ekzistis fakte ia bando. La ĉefa celo estis krei muzikaĵojn kaj inviti kantistojn por registri, kaj tiel lanĉi la kantojn libere en interreto. Laŭ la muzikistoj, estis bona varbado por esperanto kaj bona reklamo por la bando.

En 2007 la grupo memeldonis 4-titolan virtualan konceptan albumeton *Bataltemp'*. La rakonto de la albumeto estas epopeo pri milito. Partoprenis en la projekto la kantistoj **Geovani Maia** (*"Bataltemp"*), **Paulo Melo** (*"Nobla Dezir"*), kaj **Leo Yanes** (*"Heredo de la Post-Milit"*).

Post longa paŭzo, komence de la jaro 2013 la grupo anoncis rekomencan de sia agado kaj ŝanĝis sian celon. Estis starigita reala bando celante koncertojn kaj novan albumon. Tiel naskiĝis en 2013 la unuopaĵo *La Plej Bona Ĉasisto*. La temo de ĉi tiu kanto estas la dilemo de indiĝena ĉasisto kiu bezonas ĉasi sian nutraĵon kaj samtempe vidas la beston kiel fraton, loĝanton de la sama arbaro. Por tiu ĉi unuopaĵo la bando konsistis el **Leo Yanes** (kantisto), **Junior Nieri** (drumo), **Murilo Ramos** (basgitaro), **Muniz** (gitaro), kaj **Rafael Milhomem** (gitaro).

En 2015 la bando decidis lanĉi oficialan albumeton (EP) ĉe Vinilkosmo titolitan *Jen Nia Viv-River'*. Ĝi enhavas la malnovajn muzikaĵojn kaj ankaŭ la novan kiu titoligas la albumeton, kun voĉo de la invitita kantistino **Karliene Araŭjo**. *Jen Nia Viv-River'* estas ario eltirita el la metal-opero kiun **BaRok'** verkas. La juna belulino *Arasi'* kantas pri la beleco, fruktodoneco, kaj malavareco de la *Viv-River'* antaŭ ol iĝi *La ruĝa rivero* pro sango de senkulpaj indiĝenoj.



Per tiu albumeto la bando anoncas la lanĉon por 2016 de la unua oficiala albumo, kiu temos pri brazila indiĝena mitologio.

Muzikistoj kunlaborantaj en la projekto estas **Karliene Araŭjo** (voĉo), **Junior Nieri** (drumo), **Thiago Alberto** (basgitaro), **Muniz** (gitaro), kaj **Rafael Milhomem** (gitaro).



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

75-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

HERRERA DEL DUQUE,

30-a de junio ĝis 4-a de julio 2016

ALIĜILO

Plenigu tiun ĉi aliĝilon, kaj sendu ĝin al la sidejo de HEF. Oni ankaŭ povas uzi la retadreson kongreso@esperanto.es, aŭ la formularon troveblan en la retejo <http://www.esperanto.es/kongreso/>

PERSONA NOMOFAMILIA(J) NOMO(J).....
ADRESO
URBO..... (.....)
RETADRESO..... TELEFONNUMERO(J)
MEMBRO DE HEF: Jes Ne NASKIĜDATO (nedevice, nur por statistiko aŭ rabato)
DATO DE PAGO⁽¹⁾..... MANIERO DE PAGO.....
KATEGORIO.....
KOTIZO.....
DONACO.....
SUMO.....

KOTIZOJ

KATEGORIOJ	Aliĝo ĝis la 28-a de februaro 2016 ⁽¹⁾	Inter la 1-a de marto kaj la 15-a de majo 2016 ⁽¹⁾	Post la 16-a de majo 2016 kaj surloka aliĝo
Membro de HEF	35€	45€	55€
Ne membro de HEF	45€	55€	65€
Juna membro de HEF (malpli ol 30) ⁽²⁾	25€	35€	45€
Junulo nemembranta en HEF (malpli ol 30)	30€	40€	50€

La aliĝo estas senpaga por nepraj akompanantoj de handikapuloj kaj naskiĝintoj post 31-12-1995.
Se vi volas partopreni la kongreson, sed vi havas ian malfacilaĵon, bonvolu kontakti la organizantojn.

(1) La efektiva dato estos tiu de ricevo de pago.

(2) Sama rabato estas aplikebla al lernantoj de Esperanto ĉeestantaj kursojn organizitajn de grupoj aliĝitaj al HEF, komenciĝintajn inter septembro 2015 kaj aprilo 2016

Bonvolu pagi la kotizon per nia konto ĉe Paypal (admin@esperanto.es) aŭ per bankigo, nepre indikante la tekston "Kongreso" kaj [vian nomon](mailto:vian.nomon), en la bankokontoj de la "Federación Española de Esperanto":

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926 4025 aŭ BBVA: ES85 0182 1252 3102 0401 1961.

ALIAJ INFORMOJ

DEZIRAS REZERVI GASTIGADON EN JUNULARA REZIDEJO: Jes Ne
ESTAS INTERESITA PARTOPRENI EN KOMUNA VOJAĜO EL MADRIDO: Jes Ne
PRETAS PARTOPRENI EN LA PROGRAMO: (aparte menciuj proponon)
PRETAS PARTOPRENI EN LA SPEKTAKLO "VIVU LA TEATRO!": Jes Ne
KOMENTOJ:

NOTO PRI PERSONAJ INFORMOJ: VIA NOMO KAJ DEVENLOKO APEROS EN RETA LISTO DE ALIĜINTOJ KAJ EN KONGRESLIBRO; VI RAJTAS SUGESTI LA MANIERON SUB KIU ĜI APERU;
ONI PLANAS HAVIGI LISTON DE NOMOJ KAJ RETADRESOJ AL ĈIUJ KONGRESANOJ, SED VI RAJTAS PETI KE VI NE APERU EN YIU LISTO;
CETERAJ INFORMOJ ESTOS ARKIVATAJ ĈE HEF KAJ UTILIGATAJ NUR POR INTERNAJ CELOJ